

Gonzague de Reynold kontraŭ Esperanto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 681, 1976-10-27 & 29 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ni raportos al vi hodiaŭ pri la kontraŭ-esperanta agado de la svisa verkisto Gonzague de Reynold.

A.- Gonzague de Reynold naskiĝis en 1890 kaj mortis en 1970. Li ludis gravan rolon inter la romanda intelektularo per siaj verkoj kaj per sia agado literatura kaj ĵurnalisma. Li estis profesoro pri francaj lingvo kaj literaturo ĉe la Berna Universitato, svisa delegito ĉe la Komisiono por Intelekta Kunlaboro de Ligo de Nacioj, la antaŭulo de Unesko.

Cl.- Gonzague de Reynold ne uzurpis la nobelvorteton de. Liaj gepatroj estis nobeloj. La patro venis de familio de oficiroj je la servo de la franca reĝo, la patrino estis nobelino berna, von Techtelmann, kies familio konsistis el nobeloj kaj oficiroj.

A.- Dum la unua mondmilito li laboris en pacismaj pozicioj preskaŭ internaciistaj. Li estis ekzemple amiko de Romain Rolland kaj de Edmond Privat. Li volis labori por la unueco de Svislando, kontraŭ la malagregaciigaj fortoj kaŭzitaj de la milito. Tute alian pozicion li havis dum la dua mondmilito. La tendenco de Gonzague de Reynold tiam estis la sama kiel tiu de generalo Pétain ekde 1940. Kvankam, do, konsekvence, favora al Germanio, Gonzague de Reynold neniam aprobis la hitlerajn misfarojn. Ĝeneralsence oni povus difini lin faŝisto, sed certe ne nazio. Por Mussolini li havis simpatian, sed lia idolo estis Salazar.

Cl.- Gonzague de Reynold estas la ekzemplo, ke antaŭjuĝoj surbaze de politika pasio povas mallumigi eĉ la plej kleran spiriton inter la intelektularo. Lia rezono, kiam temas pri esperanto, tiel foniĝas, ke pri ĝi li finfine rakontas nekredeblajn stultaĵojn, li, kiu fakte tute ne estas homo stulta.

A.- Gonzague de Reynold rakontas en siaj memoraĵoj, kiel li opoziciis al esperanto en la kadro de la Komisiono por Intelekta Kunlaboro de Ligo de Nacioj, kiam tiu ĉi komisiono estis komisiita fare de la ĝenerala kunveno de Ligo de Nacioj pristudi la problemon de internacia helplingvo. La respondotaj demandoj estis:

- a) Ĉu ekzistas bezono por internacia helplingvo?
- b) Kaj se jes, kiu lingvo estu selektata?

Cl.- Okaze de la dua ĝenerala kunveno de Ligo de Nacioj, en 1922, la japana delegito Inazo Nitobe prezentis raporton pri esperanto kiel lingvo helpa internacia, kiun grandparte redaktis Edmond Privat. Ĝuste tiu ĉi raporto estis submetita al la Komisiono por Intelekta Kunlaboro kaj en sia subfosa agado Gonzague de Reynold estis aktive helpata de la franca delegito.

A.- Estis malfacile por Francio tiutempe akcepti planlingvon. Ĉe la registaro sidadis dekstraj partioj. Ni ne forgesu, ke en la 17-a kaj 18-a jarcentoj Francio estis la plej forta lando en Eŭropo el vidpunkto ekonomia kaj milita, kaj ke la franca lingvo estis la lingvo de la intelektuloj kaj kleruloj. Ankoraŭ en la 19-a jarcento ĝi estis la lingvo de la diplomatio. Kiam oni regis, estas malfacile rezigni je tiaspeca prestiĝo.

Cl.- Gonzague de Reynold ne estis nur kontraŭ esperanto, sed kontraŭ la ideo mem de artefarita internacia helplingvo. En artikolo aperinta en La Revue de Genève en 1925 li klarigas, kiel li studis por Ligo de Nacioj la problemon de internacia planlingvo. Li asertas, ke li estis helpita, sed li ne diras, kiu lin helpis.

A.- Tri estas la ĉefpunktoj de lia argumentado :

a) ĉu oni elektos nacian lingvon, la anglan, la francan kaj kiujn kriteriojn adopti por ilin selekti?

b) ebleco adopti planlingvon: li asertas, ke li komplete detruis tiun eblan alternativon.

c) adopto de la latina lingvo. Li scias, ke la latina ne taŭgas por modernaj argumentoj. Oni ja povas utiligi perifrazojn, kaj Vatikano ja tiurilate estas aparte sperta, sed ne estas tre facile. Cetere, la latino de la lernejoj estas lingvo fabrikita, neniam ekzistinta, simpligita. En la historia realo ekzistis multaj latinoj. Gonzague de Reynold scias ĉion tion sed, egale, li proponas adopti la latinon de Erasmo, el la epoko, kiam ĝi estis la intelektula lingvo de Eŭropo.

Cl.- Sed tiu latino neniam estis parolata de la popolo: ĝi estis aristokrata lingvo. En tio respeguliĝis la baza vidpunkto de Gonzague de Reynold: la demokratio estas falsa reĝimo, kiun li opoziciigas al la reala popolo.

A.- En tiu ĉi artikolo Gonzague de Reynold esprimis fortan antipation kontraŭ Zamenhof. Unu el la riproĉoj estas, ke Zamenhof unue ellaboris la strukturon de sia lingvo, kaj poste la vortaron. Sed la ĉefa kritiko estis direktita kontraŭ la internaciismo humanisma de Zamenhof mem. Por Gonzague de Reynold unue venas la patrio, poste ĉio alia. Fine li riproĉis al Zamenhof lian judecon kaj slavecon. Nur malbona povas esti lingvo, kiu konservas kelkajn slavajn radikojn kaj kiun kreis judo abstrakta kaj mistika.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*